# tejo:aktuale

n°510 | Novembro 2025

**Karaj abonantoj, rebonvenon!**
La novaj volontuloj en Roterdamo jam iom post iom adaptiĝas al sia nova vivo meze de bicikloj, pluvo kaj la varma etoso de TEJO. Novembro alportas ne nur pli malvarmajn tagojn, sed ankaŭ niajn unuajn spertojn partoprenante en TEJO-eventoj – inter ili la **TEJO-seminario en Kipro** kaj **KKPS**.
Legu tiun ĉi numeron de TEJO-aktuale kaj eksciu pri la novaj alvokoj, okazintaj eventoj kaj la vivo de nia volontula teamo en la Centra Oficejo. Agrablan legadon kaj varman novembron el la koro de Esperantujo! 🌍

## ANONCOJ




### TEJO rolos kiel esperantista junulara organizo en la estraro de CoNGO

Kadre de la Ĝenerala Asembleo de CoNGO (anglalingve Conference of Non-Governmental Organizations in Consultative Relationship with the United Nations) okazinta fine de oktobro en Novjorko kaj interrete, kuniĝis reprezentantoj de pli ol sepdek internaciaj neregistaraj organizoj.

Legu pli pri la elektiĝo de TEJO en ĝia estraro!

## EVENTOJ




### Virtuala Kongreso de Esperanto

Ĉu vi jam pretigis vian Discord-konton por VK, okazonta **de la 4-a ĝis la 7-a de decembro 2025**? Venu por amuziĝi kun pli ol 1000 esperantistoj el la tuta mondo! Atentu, la aliĝperiodo estis plilongigita, hodiaŭ estas la lasta tago por aliĝi senpage por membroj de TEJO/UEA!

Por pliaj informoj legu la programon de la

evento.




## Subvencio por la Junulara E-Semajno

Se vi estas muzikemulo loĝanta en Francio aŭ Germanio kaj aĝas ĝis 30 jarojn, vi povas partopreni en muzikprojekto financita de la Oficejo por Germana-Franca Junulara Kunlaboro. Kandidatiĝu nun!

La projekto okazos dum **JES, en Burg (Spreewald)**, **de la 28-a de decembro 2025 ĝis la 4-a de januaro 2026**.

## Malfermiĝis la IJK-aliĝilo!

La 82-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO okazos **en Tiana, Katalunio (Hispanio), de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026**. Partoprenu en IJK por sperti tre raran plenan suneklipson, ĝui regionon riĉan pri kulturo, historio kaj gastronomio, kaj pasigi varman someron ĉe belaj plaĝoj kaj verdaj arbaroj kun esperantistoj de la tuta mondo!

La unua aliĝperiodo daŭros ĝis la 31-a de januaro 2026. Aliĝu ĝis la 15-a de decembro kaj ricevu senpagan T-ĉemizon!

Jen pliaj detaloj pri la kongreso.

---

# PASINTAJ EVENTOJ




## TEJO-seminario pri packonstruado

La TEJO-seminario pri packonstruado estas finiĝanta, post semajno plena je lernitaĵoj...
Dudeko da junuloj trejniĝis en **Pervolio kaj Nikozio, Kipro**, pri interkulturaj dialogoj, kun enrigardoj en la pasintecon, por iĝi la morgaŭaj packonstruantoj.

Vidu filmeton de la evento. Pli da informoj pri kiel okazis la seminario sekvos en niaj sociaj retoj

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**

# La Horoskopo



**Antaŭdirita**
**de TEJO-Aŭguristino**
**Sortirja**

La steloj ĉi-monate zumas super la universo, portante mesaĝojn por volontuloj, aktivuloj, retbabilantoj kaj por ĉiuj, kiuj ankoraŭ provas klarigi al siaj parencoj kial “tutmonda lingvo” ne estas sekto (aŭ eble ja estas?). Decembro promesas surprizojn, retrovojn, kaj eĉ ioman magion, se vi scias kie serĉi ĝin (konsileto: kutime ene de listoj de eventpartoprenantoj). Do spiru profunde, ĉerpu la lastajn energiojn de la jaro kaj lasu la stelojn montri la vojon. ✨




♈ Decembro alportas novan motiviĝon por lerni – eble refreŝigi siajn konojn pri la akuzativo aŭ fine ekpraktiki paroladon. Ĉu kurso? Ĉu renkontiĝo? La steloj konsilas: elektu ĉion, kio helpas vin moviĝi antaŭen en Esperantujo.




♉Vi bezonas ĝojon, kaj feliĉe decembro alportas ĝin. Bona momento por reorganizi viajn planojn por 2026 aŭ decidi ĉeesti eventon de TEJO. En am-aferoj: iu, kiun vi renkontis dum antaŭa renkontiĝo, povus neatendite reaperi. Serĉu en la Amindumejo de VK.




♊ La energio estas alta, la interesiĝo pri homoj ankaŭ. Ĉi-monate vi estos la plej komunikema signo – perfekta por volontuloj, aktivuloj kaj ĉiuj, kiuj amas rakonti pri siaj spertoj en Esperantujo. Zorgu: ne akceptu tro da respondecoj.




♋Domema etoso: vi preferos litkovrilojn al kongresoj. Sed ne maltrankviliĝu, ankaŭ hejme okazos aferoj – kaj eble iu TEJO-seminario aŭ reta renkontiĝo tentos vin eliri el via komfortzono. En financoj: ne paniku, la steloj estas kun vi.




♌ Ĉi-monate vi brilos, eĉ se la vetero ne. Vi radias amikemon, bonkorecon kaj helpemon al ĉiuj. Se vi estas kunorganizanto aŭ partoprenanto de iu evento, vi havos magnetan efikon je la homoj.

♍La fino de la jaro instigos vin ordigi dokumentojn, taskojn kaj menson. Perfekta




momento por reordigi viajn TEJO-projektojn, atenti pri subvencioj, aŭ komenci planadon por 2026. En rilatoj: malfermu la koron, ne nur la dosierojn.




♎Vi serĉas ekvilibron inter agado kaj ripozo. Kun la jarfinaj eventoj alproksimiĝantaj, vi povos fine retrovi harmonion. Por vi, ĉio rilatas al homoj: kio plej inspiros vin estas renkontiĝo kun Esperanto-amikoj, eĉ mallonga.




♏ La steloj ŝajnas diri: “Agadu!”. Perfekta periodo por fari tion, kion vi prokrastis – ekde kandidatiĝo al rolo en TEJO ĝis planado de persona vojaĝo al renkontiĝo. En amo: intenseco, kiel ĉiam, sed ĉi-foje pozitiva.




♐ Via pozitiva energio eksplodas dum decembro. Perfekta tempo por proponi freŝan ideon en via loka grupo. Se vi partoprenos en iu jarfina renkontiĝo, preparu vin por surpriza renkonto.




♑ Vi kutime estas serioza, sed ĉi-monate la steloj invitas vin meti la laboron flanken kaj enmiksi vin en renkontojn kaj festojn. Decembro favoras profesiajn kontaktiĝojn – eĉ simpla retmesaĝo al TEJO-teamo povas malfermi pordon al nova kunlaboro. Fidu je viaj kapabloj.




♒Inspirplena monato! Vi sentos bezonon krei: afiŝon por evento, ideon por video aŭ eĉ novan vortludon en Esperanto. Kial ne proponi ĝin en via sekva junulara renkontiĝo? La universo ebligas al vi brili – nur faru la unuan paŝon.




♓ Vi sopiras al trankvilo, sed decembro portos neatenditan socian ondon. Kiam vi partoprenos en la babilejoj de VK, preparu vin por esti la centro de atento, eĉ se vi ne intencis tion. Viaj ideoj estos aprezataj pli ol vi pensas.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands